


**ROK XXVI.
MARZEC
N-r 3.**



**JARO XXVI.
MARTO
N-o 3.**

EL POLLANDAJ VIDINDAĴOJ...



Abatejo de Benediktanoj en Tyniec (proksime de Kraków) belege situita
sur abrupta rokego super Vistulo.

**ESPERANTYSTA POLSKI
POLA ESPERANTISTO**

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
EL DONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ
TADEUSZ HODAKÓWSKI

REDAKTOR ODPOWIEDZIALNY: JULJUSZ KRISS.

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—.

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

1 strona	Zł. 60.—
1/2 strony	" 32.—
1/4 strony	" 17.—
1/8 strony	" 10.—

ANONCOJ:

1 paĝo	Zł. 60.—
1/2 paĝo	" 32.—
1/4 paĝo	" 17.—
1/8 paĝo	" 10.—

PRZEDSTAWICIELE — REPRESENTANTOJ.

Katowice: Soc. de Esper. Amikoj, Wawelska 3.

Paryż: S. Grenkamp, Paris 6. 4 rue de Vaugirard.

Warszawa: Pola Stud. Esperantista Societo, Leszno 99. m. 5.

Przyjmują zamówienia abonament. i ogłoszenia do „Polskiego Esper.“ i „Pomocniczego Języka Świat.“

Akceptas abonojn kaj anoncojn por „Pola Esperantisto“ kaj „Pomocniczy Język Światowy“.

WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado“.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—.

Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

Mi deziras korespondadi kun gesamideanoj pri temo: Vivo de la Muslimanoj en Polujo. Mia adreso: Salik Bravo, fervojoficisto, Sarajevo. Bistrik džamijo 6. Jugoslavujo.

DO P. T. CZYTELNIKÓW!

Upraszamy uprzejmie P. T. Czytelników o załączenie znaczka pocztowego na odpowiedź, przy wszelkiej korespondencji, zarówno redakcyjnej jak i administracyjnej.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXVI JARO

K R A K Ó W
MARZEC 1932 MARTO

Nr. 3 Nr-o

LA PROPAGANDA SUGESTO.

Kun granda intereso mi legis en la nunjara februara „Pola Esperantisto“ la artikolon sub la supra titolo. Jes, la subskripcia propagando certe multe utilos al nia movado. Nun certe ankaŭ estas bona tempo por ĝi. Ĉie, kie oni same aŭ simile procedis, la sukceso estis bona. La subskribkolektado, por senarmigo ekzemple, antaŭ tiu konferenco estis ĉie multe atentata. Mi tial opinias: Polujo proponu al la esperantistaj organizacioj de Ĉeĥoslovakujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Rumanujo, Bulgarujo kaj Jugoslavujo (esp. malgranda entento), ev. ankaŭ de la baltaj ŝtatoj konforman procedon, t. e. invitu al samtempa subskribkolektado, kaj, se oni poste en la tiurilataj al la registaroj direktitaj peticioj pri enkonduko de esperanto-instruado en ĉiujn lernejojn, montros la utilon de esp., uzita en la reciprokaj interrilatoj de tiuj ŝtatoj, certe tio faros tre bonan impreson kaj emigos tiujn ŝtatojn por nia afero, ĉar ja ŝparo de elspezoj kaj tre simpligita procedo tiel estos montrataj. S-ro Dro Czubyński antaŭ kelkaj jaroj ankaŭ proponis, ke kunigu sin almenaŭ 6 ŝtatoj por reciproka uzado de esp. — Tiel oni al la grandŝtatoj povus montri, kiel infane simpla estas tiu afero kaj ili fakte devus agi tre malsaĝe, se ili ne aliĝus.

Mi pri la subskribkolektado jam posedas spertojn, ĉar en jaro 1928 mi tre detale priskribis tiun planon en „Heroldo de Esp.“ Nr. 26 (470). Poste mi al la 20-a Universala Kongreso en Antverpeno per speciala parolado priskribis la projekton kaj atingis la kongresdecidon, ke I. C. K. estis komisiita gvidi tiun aferon. I. C. K. eklaboris, mi kunlaboris, ni vidis multan emon kaj intereson de ĉiuj flankoj, sed okazis mispaŝo. I. C. K., opiniante, ke la kunlaboro de la esperantista instruistaro multe helpos en tiu afero, invitis TAGE-n al kunlaboro. TAGE unue emis, sed respondis poste negative, dezirante partopreni en la substribokolektado nur tiam, se ĝi okazos samtempe en kontakto kun SAT! Kaj, ĉar „tia entreprenado ne estis antaŭvidita en la decido de Antverpeno“, ICK. „ne vidis la eblecon fari ĝin“. — Pro tiaj kaŭzoj finiĝis tiu afero! Mi do opinias, ke estos plej bone, se la esp.-organizacioj de la cititaj ŝtatoj interkonsente faros la aferon. Grave estas, ke oni komencu tuj. Tiu propagando ne estos multekosta, kontraŭe ĝi estos certe la plej malkara, tamen tre efika, kaj, kiel s-ro Lejzerowicz trafe diras, nova rimedo.

Estos nur necese, ke ekz. en Polujo P. E. D. presigu kelkajn milojn da egalformataj subskriblistoj kun jena nacilingva kaj esperanta „kapo“ kaj rubrikoj: **Subskripcia listo.** „La subskribintoj opinias necesa la devigan instruadon de esperanto en ĉiuj lernejoj kaj petas la plenumon de tiu deziro“. La rubrikoj estu: 1) nomo, alnomo, profesio; 2) preciza adreso; 3) propremana subskribo. — La subskriblistoj do estos tre malkaraj, oni nur pagos kvazaŭ la paperon, eble 5 gr. po unu oficforma folio, sur kiu oni povos kolekti 100 subskribojn. Tiom da propagando por 5 gr.! Ĉiu esp. grupo aĉetos po 10 aŭ pli da folioj = 50 gr.; al la izoluloj oni ev. senpage sendu la foliojn. Ĉie samideano tuj ekkolektu, traktante la aferon tre serioze. Ĉiu subskribo estu malfalsa, ĉiu subskribinto sciu, kion kaj kial li subskribis. Oni subskribigu nur plenkreskulojn. Se ĉiu samcelano kolektos nur la subskribojn de siaj familianoj kaj parencoj, jam estos 20—30; sed ĉiu fervorulo povos facile kolekti kelkajn centojn. Kiam en 1928 la sileziaj esperantanoj ekkolektis, unu samideano-fervojisto dum 4 semajnoj kolektis 1440 subskribojn! Kolektante, ni de neniu postulis, ke li fariĝu esperantisto, nur amiko de esp. — Kiu deziris lerni esperanton, al tiu ni tuj prizorgis la lernolibron ktp., tiel ni gajnis multajn novajn esperantanojn. Kvankam ni ne povis uzi la subskriblistojn por peticio al la registaro, tamen la atingita bona, vasta propagando valoris la penadon. Do nenia fiasko estas ebla!

Polujo estas la lulilo de esperanto. Ĉiu bona pola patrioto do devas penadi, ke esp. fariĝu mondlingvo, ĉar tiel vastiĝos la gloro de Polujo tra la tuta mondo. Tial Poloj ekagu! Dum la proksimaj landaj esp.-kongresoj oni jam ĉie pritraktu tiun aferon!

L. Krysta.

KONKRETIGO DE PROPONO DE S-O LEJZEROWICZ.

Proponon, ke oni kolektu la nomojn de personoj ne-esperantaj, sed favoraj por esperanto mi prezentis en artikolo **MINACAS KRIZO**. Kolekti nomojn de apartaj personoj estas preskaŭ neeble en tre grandaj entreprenoj. Oni tion ĉi faris por ŝanĝi la nomon de strato Dzika je tiu de Zamenhof. Estas kolektitaj pli ol 20.000 subskriboj, sekve kvazaŭ malgranda urbo. Bindita verko estis tre dika. Nun imagu al Vi 5 milionojn da subskriboj. La tuta biblioteko! Neniu ĝin legus. Bona por arkivo, sed ne por aŭdienco. Sed ideo bona en iom alia efektivigo. Ne la nomojn de personoj oni kolektu, sed la nomojn de societoj, institucioj, grupoj ekz. profesoroj, kuracistoj, advokatoj, k. t. p.) Verko de Zawada povus montri la vojon. Sed pri kio oni kolektos subskribojn: por Esperanto? Estas nenio! Por enkonduko de Esperanto en la lernejojn polajn? Ankaŭ ne bone! Esp. nur en lernejoj polaj ne estus necesa, sed havus valoron kaj signifon, se ĝi estus samtempe enkondukata en aliaj landoj. Sekve subskriboj ne povas esti nur kolektataj nur en Polujo. Sekve ne estas afero nur pola. Oni do kolektu la subskribojn, ke Polujo alpaŝu al Interŝtata Akordo Esperanta. Se tiel estus kolektitaj la subskriboj, oni pli zorgeme trastudu, kion mi skribis en proponita citita artikolo. Mi bedaŭras, ke oni ne ĉiam trapensas miajn artikolojn ĝis fine!

dr. Antoni Czubryński
(Mława)

V. POLLANDA KONGRESO DE ESPER.

La Universala Kongreso okazinta en Kraków malhelpis nin pasintjare organizi nian landan kunvenon. Nunjare tamen malgraŭ ĝenerala krizo ni trovas necesa daŭrigi nian ĉiujaran kunestadon. La Ekzekutiva Komitato de P. E. D. decidis akcepti inviton de P. E. A. en Lublin okazigi la V. Pollandan Kongreson de Esperanto en ĝia urbo. Do, ni diskonigas tiun ĉi novaĵon, ke nunjara kongreso okazos en Lublin dum Pentekosto t. e. en la tagoj 15—16 de majo kj.

Nia lasta en la jaro 1930 okazinta kongreso en Łódź alportis plenan sukceson kaj ni esperas, ke ankaŭ la nunjara malgraŭ ĝenerala manko de mono ne estos malpli multenombra kaj ĝia sukceso estos same plena kiel en Łódź. Lublinaj samideanoj certe preparos ĉion por akcepti gastame kaj plej kore alvenintajn gastojn kaj oferos siajn fortojn por certigi al ĉiu samideano plezurigan restadon en la kongresurbo.

Ni invitas ĉiujn al la V. Pollanda Kongreso de Esperanto en Lublin!

Adreso de la loka org. Komitato: Pola Esperanto-Asocio, **Lublin**,
str. Krakowskie Przedmieście 60. Kotizo 5 zł. **P. E. D.**

KOMUNIKO DE P. E. D.

Samtempe kun la V. Pollanda Kongreso de Esperanto okazos en Lublin en la tagoj 15—16 de majo kj.

VI. Konferenco de P. E. D.

kun jena tagordo:

1. Protokolo de la V. Konferenco
2. Raportoj de la Ekzekutiva Komitato
3. Elektoj
4. Proponoj

Eventualaj proponoj de la grupoj, kiujn ni povus meti en la tagordon devas esti alsenditaj antaŭ la 1 de majo kj.

Ni alvokas la grupojn pagi la kotizojn al konto P. K. O. 408.066 (J. Alfus, Kraków). La nepagintaj grupoj estos forstrekitaĵoj el la listo de P. E. D.

Aliĝis 2 novaj grupoj: Pola Esperantista Klubo en Kraków kaj Juna Samideano en Kraków.

La Ekzekutiva Komitato iniciatis novan agadon koncerne la enkondukon de Esperanto en lernejojn. P. E. D. komencas kolektadon de subskriboj sur folioj postulantaj enkondukon de Esperanto en lernejojn. La subskribitaj folioj estos poste prezentitaj al Ministerio de Klerigado. La agado estas komencata en Kraków kaj ni petas ĉiujn samideanojn en Pollando komenci la samon en sia regiono. Por unuecigi la aferon P. E. D. presigis la foliojn kaj ni petas uzi ilin por tiu ĉi, postulante ilin ĉe ni kontraŭ repago de presadkosto (5 groŝojn por 1 folio). Detaloj pri tiu ĉi afero ankoraŭ sekvos.

Ekzekutiva Komitato de P. E. D.

La 30. III. je la 22 h. 45 m. ĉiuj radistacioj de Pollando disaŭdigos esperantan prelegon de s-o prof. Bujwid je la temo: „Partopreno de Pollando en tutmonda kulturo“. Ĉiuj aŭskultu kaj nepre sendu dankleterojn al: Dyrekcja Polskiego Radja, Warszawa, petante pri pluj esp. disaŭdigoj.

PROF. DRO WALERY GOETEL.

NACIAJ PARKOJ KAJ REZERVAĴOJ.

„Se iu enirinte arbaron volus subtranĉi arbojn, kies prezo ŝajnas alta, ekzemple taksusojn aŭ similajn, tiam li povas esti ekkaptita de sinjoro aŭ de heredanto, kaj tuj donita kiel garantiaĵo al tiuj, kiuj lin „volas havi“. Same la forstetoj, kie estas malmultaj arboj, devas esti konservataj“.

Fragmento el la dekreto: „Leĝo donita de la reĝo Vladislavo Jagiello en Krakovo kaj Varto, en la j. 1423.

Profunda, vere reĝa saĝo kaj digno elfluas el tiuj vortoj de nia potenca reĝo.

Per tiaj juĝoj kaj leĝoj, konformaj al alta kulturŝtato de nia iama Respubliko, atestis la reĝo Vlad. Jagiello, ke la defendo kaj konservo de la naturo en malnova Polujo apartenis al unuaj en Eŭropo.

La leĝoj de Jagiello kaj de liaj posteuloj kontribuis sendube al konservo de la plej belaj restaĵoj de naturo en Polujo.

Kaj hodiaŭ, kiam kelkaj jarcentoj estas forfluintaj, ni kun ĝojo rimarkas, ke nur la mezo de nia patrujo estas plata kaj monotona. La kulpo kuŝas en detrua ekstermado de l' arbaroj dum la tempoj de la rusa okupacio de kongres-teritorioj, kiam la malamiko ne zorgis pri tiuj arbaroj, la plej bela ornamo de la pejzaĝo.

Tamen en larĝaj limteritorioj de la Respubliko la naturbelo disvolviĝas en plena lukso. Arĝentaj ondoj de Baltiko murmuradas ĉe la pentrin-daj bordoj, brilantaj platoj de lagoj en Pomeranio ĉirkaŭas densajn arbarmurojn per verda ringo, en ĉirkaŭaĵo de Vilno, Grodno kaj Białystok susuras ĝis nun ampleksaj arbarrestaĵoj.

Sur larĝaj ebenaĵoj de Polesie disversiĝas sennombraj akvegoj kaj kotejoj, kun malsupraĵaj arbaroj, torfejoj kaj kverkarbustoj. Profunde entranĉitaj, sur ebenaĵo neesperite elŝiritaj riverkavaĵoj de Dniestro kaj ĝiaj branĉriveroj formas tiel originalan pejzaĝon de Podole.

Nordokcidente de la kuniĝo de Vistulo kaj Sano eniĝas en la koron de Pollando Montoj Świętokrzyskie, la plej malnovaj montoj de Polujo. Eĉ apude de la monotonio, fumoplena, karbominejteritorio ekiĝis naturbela donaco: iomete ondita, ornamita de akritaj montmuroj, de l' valoj de Ojców, Mników kaj Panińskie Skąły — pejzaĝo de Krakova ĉirkaŭaĵo.

Kaj sur niaj sudlimoj, sur grandega arko de Karpatoj, etendita sur 900 kilometra spaco de Cieszyn ĝis rumana limo, riĉe disĵetitaj estas niaj belegaj pejzaĝoj: larĝaj, dikstaturaj, per malnovaj arbaregoj, murmurantaj Beskidoj Sileziaj, Żywieckie, Gorce kaj Sądeckie, grandegaj kupoloj, sovaĝaj kaj originaj Bieszczady, Gorgany kaj Czarnohora. La monta pejzaĝo atingis sian plej altan streĉiĝon en Podhale, kie sur baro de l' potenco Babia monto kaj masiva Turbacz, disvolviĝis inter malsovaĝaj montetoj kuraĝa formo de Pieninoj kaj impona lukso de la plej altaj, polaj montoj — Tatroj.

Ĉiu, kiu ekvidos tiujn trezorojn de nia patrolando konvinkiĝos, ke tiuflanke ili ne malpli multe valoras, ol la plej famaj eĉ vidindaĵoj eksterlandaj.

Tamen por ke la mirakloj de nia naturo ekzistu plue kaj plue povu ĝojigi nin kaj niajn infanojn, ni devas memori, ke ilia beleco estas sen-

preza kaj estas nia devo defendi ĝin kontraŭ detruo. Ni ne povas permesi, ke la plej grandaj natur-trezoroj de Polujo estu neniigitaj de premo de la civilizacio tiel, kiel fariĝis en aliaj eŭropaj landoj, ekzemple en Germanujo, kie kun la plej alta fortostreĉo kaj grandega elspezo de mono fariĝas hodiaŭ terenoj de la naturkonservo.

Bonŝance la konscio, ke la konservo de nia pejzaĝo estas necesa penetris profunde la kulturajn sferojn kaj hodiaŭ, dank' al forta propagando, la tutan polan nacion. Jam depost multaj jaroj daŭras laboro por naturkonservo, kies estraro estas: „Ŝtata konsilantaro de la naturkonservo“, organo de la ministerio de klerigo, laboranta sub la gvidado de la profesoro de la Jagiellona Universitato, dro Vl. Šafer, kun kiu kunlaboras la plej eminentaj fakuloj el la Pollando tuta. Kun la „Ŝtata Konsilantaro por la naturkonservo“ kunlaboras ĉiuj kulturaj kaj sociaj institucioj, sub la gvidado de la Pola Geografia Asocio, aganta sur malaltaĵoj. Tiuj institucioj kuniĝis en „Ligo por naturkonservo“ ĉirkaŭprenanta nian tutan patrujon.

La rezulto de tiuj laboroj estas jam hodiaŭ la kreo en Polujo de kelkaj terenoj por la naturkonservo. En tiu fako ni okupas unu el la unuaj lokoj en Eŭropo kaj tiel bone en la kreo de la rezervaĵoj, tio estas pli malgrandaj terenoj, en kiuj oni konservas la pejzaĝon, plantaron kaj la bestaron, kiel ankaŭ en la kreo de la **Naciaj parkoj** t. e. grandaj ejoj por plena naturkonservo. Jen nia atingajo, pro kiu ni povas esti fieraj: 3 Parkoj Naciaj, jam kreitaj, 3 kreataj, pli ol 50 arbarrezervejoj, 35 stepaj, 13 torfaj, 5 lagaj, 5 rokaj rezervejoj, je la surfaco de kelkdek mil hektaroj.

Estas du tute finfaritaj Naciaj Parkoj, ĉirkaŭprenantaj tutan konservindan terenon: unu en arbarego de Białowieża, la alia en Pieniny. En Parko de Białowieża la vizitanto miras pri l' arbalteguloj, kiel 50-metra piceo, pli ol 600 jara kverko, ĉielcelantaj pinoj, tilioj, betuloj, ulmoj, aceroj, kaj multaj alispecaj arboj farantaj veran malaltaĵan arbaregon, la saman, kiu dum Jagiellonaj tempoj susuradis super la kapoj de ĉasantaj tie reĝoj. En tiu arbarego reviviĝis, tiuspece ununuraj en Eŭropo, uroj.

La Nacia Parko en Pieninoj estas vera juvelo de monta pejzaĝo. Blankaj pingloj kaj roketoj de Pieniny, enkadrigitaj de verdaj, gajaj forstoj kaj diverskoloraj valoj, superpendas deklivege la frenezantajn ondojn de la puregaj akvoj de Dunajec.

Sur deklivoj de majesta Czarnohora estas en ŝtataj arbaroj farita la 3-a Nacia Parko. Tie estas konservataj karpataj arbaregoj, kun sen-nombraj huboj de montegaj pinoj, kaj verdaj herbejoj, sovaĝaj kaj malproksimaj de la homsidejoj, forstoj, en kiuj regas la urso kaj karpata cervo, linko kaj lupo.

La plej bela el ĉiuj estos la Tatra Parko. Ĝia beleco enhaviĝas en ĉielaltaj rokoj, granitaj pintoj, inter kiuj kaŝiĝas la riĉeco de la koloraj montlagoj, arboplenaj forstoj piceaj kaj miksitaj, kun perdiĝantaj ekzempleroj de la plantaro kaj faŭno.

Nune estas farata Nacia Parko sur Bahia monto, la plej alta pinto de okcidenta Beskido. Ĝi enhavos pintajn partojn kun karakteriza ŝtonaro, de kiu etendiĝas belega vidaĵo al Tatroj kaj la plej altaj partoj de l' arbaroj kaj montpaŝtejoj. La Nacia Parko en montoj Świętokrzyskie, parte jam farita en ŝtatarbarejoj, ĉirkaŭprenos la faman de la romano de S. Zeromski, abian arbaregon, sidejon de malnovaj dioj, sur kiu iradis la san-

kta cervo, la forkuro de l' anaĥoretoj, granda terspiro kaj eterneca kanto“. („Abia arbarego“).

Inter la rezervaĵoj, jam faritaj en Polujo estas menciinda: la lago Ŝvitež, kunigita kun la memoro de Adam Mickiewicz, „Kępa Radłowska“ sur Baltiko, kun miksitaj arbaroj kaj riĉa plantaro; la rezervejoj en ĉirkaŭaĵo de Grodno por formortanta alko, la plej granda en Eŭropo rezervejo por taksusoj, proksime de Kolomyja. En Karpatoj belegajn arbarrezervejojn faris grafo A. Stadnicki, kaj en Gorce en la restaĵoj de l' arbarego prikantita de VI. Orkan, grafo Wodzicki. Estas ankaŭ farata rezervejo sur Barania monto en ŝtatarbaroj, kiu ĉirkaŭprenas la nacian sanktaĵon: la fontarojn de Vistulo.

Tiamaniere en tuta Pollando disvolviĝas la laboro protekta, antaŭ la detruo de la plej belaj naturrestaĵoj de nia patrujo. Tiu laboro havas ne nur kulturen kaj idean signifon, ĉar la terenoj de la Naciaj parkoj kaj rezervejoj fariĝas unuarangaj, turistaj vidindaĵoj, kiuj allogas la turistan movadon same enlandan, kiel eksterlandan. La Naciaj Parkoj havas do grandan ekonomian signifon por nia patrolando, tiel riĉa je naturbelo, kaj tiel ruinigita ekonomie de la milito.

Tuta Nacio sekvu do la devizon: konservi la naturon kaj fari Naciajn Parkojn!

Tradukis Konato.

TADEUSZ BILIŃSKI.

PARIZO, LA URBO DE LUMO KAJ ĜOJO.

II.

Komencante de granda poeto **Jan Kochanowski**, kiu vizitis en Parizo la majstron Ronsard kaj ĉi-tie, certe dankante al Dio pro tiuj mirindaĵoj, kiujn li ekvidis en Parizo, li verkis sian inspirplenan himnon „Kion Vi volas de ni, Sinjoro, por viaj malavaraj donacaj“ (Czego chcesz Panie, od nas za Twe hojne dary) — do, de li komencante ĝis la lastaj tempoj Parizo iĝis pilgrimejo de plej eminentaj viroj, poetoj, artistoj kaj muzikistoj (komponistoj) polaj kaj aliaj ekz. **Mickiewicz**, **Słowacki**, **Krasieński**, **Norwid**, **Chopin** kaj multaj aliaj romantikuloj — poste **Wyspiański**, **Żeromski**, **Reymont**, **Weyssenhof**, **Boy-Zeleński** k. t. p. Ili ĉiuj maturiĝis ĉi-tie en la varmeo kaj en la briloj de tiu unika galika kulturo kaj eternigis en siaj verkoj la belecon kaj magian, altiran sorĉon de Parizo.

Depost 19-a jarcento preskaŭ ĉiu romanverkisto opiniis kiel sian devon elsendi sian heroon aŭ heroinon al Parizo.

Do veturas tien **Wokulski** en „Pupo“ de Prus — **Płoszowski** („Sendogmo“ de **Sienkiewicz**) **Podfilipski** — de **Weyssenhof**, **Dro Judym** („Sendomaj homoj“) k. t. p.

Sendube nenia urbo en Eŭropo — krom **Monte Carlo** estis tiel populara kaj ŝatata romanagadejo por la romanverkistoj kiel ĝuste Parizo.

Kaj kiom da pentristoj kaj skulptistoj traŝovis sin en Parizo aŭ ekloĝis ĉi-tie konstante, adoptinte Parizon kiel la duan patrolandon kaj aklimatizinte sin tute, ke oni ne povas, distingi ilin de indiĝenaj Parizanoj. Multaj el ili eĉ ne volas jam aŭdi pri la hejmveturado, ĉar ili ne povas imagi al si la vivon sen Parizo, kiu simple iĝis por ili ia narkotiko, sen kiu oni ne povas ekzisti.

Kaj stranga afero! Eĉ homoj, kiuj ne povas utiligi plene la ĉarmojn kaj ĝojojn de Parizo, ĉar ili simple ne havas konvenan... monon, loĝante ofte en mansardoj kaj triarangaj hoteletoj — se ne sub pontoj de Sekvano kaj suferante malsaton — kaj eĉ ili ne volas ankaŭ rezigni de Parizo kiu, ja, estas por ili malbona duonpatrino. Tia estas la sorĉo de tiu urbo, al kiu neniu povas rezisti.

Sed tiu urbo de lumo havas ankoraŭ la duan vizaĝon, kiu ne estas konata al ĉiuj fremduloj gastantaj nur mallongtempe en Parizo. Tiu vizaĝo estas vualita per masko de la nokto kaj sekreto kaj ĝi kaŝas ankaŭ multajn „vidindaĵojn“ nealireblajn por ĉiuj kaj antaŭ ĉio por tiuj, kiuj ne posedas sufiĉe da... bonvalora mono.

Tio estas „Paris la nuit“ — Parizo de la nokto. Flanke de elegantaj kaj luksaj dancejoj, kiel ekz. en **Hotelo Ritz** — multaj pli malgrandaj apartamentoj, kie oni dancas kaj drinkas „cock-tails“, ĉampanon kaj eĉ polan „puran“ aŭ „luksan“ brandon, kiu estas tie fame konata kaj ŝatata. Krom oficialaj publikaj distraĵejoj, kiel musik - halls - kabaretoj, bulvardaj teatretoj, cirkoj kaj grandegaj kinematografejoj, ĉevalkuradoj k. a. — troviĝas en Parizo ankaŭ pli sekretaj ejoj, kiel ekz. „maisons de rendez-vous“ (domoj de rendevuoj), „romaj banejoj“ nur por viroj, sekretaj kinematografoj kaj fine tute kaŝitaj kluboj de morfinistoj, kokainistoj, sadistoj kaj similaj. Estas eĉ speciala gvidlibro de plezuroj (guide de plaisirs), kiu „gvidas“ la monhavantajn fremdulojn tra la kaŝitaj lokoj de diversaj plezuroj kaj... pekoj, kies nombro estas senfina. Ĉiuloke en Parizo oni sentas tiun specialan erotikan atmosferon, kiu estas karakteriza por la urbo de lumo kaj peko.

Sed oni devas tie senprokraste akcenti, ke indiĝenaj Parizanoj antaŭ ĉio — la pariza burĝaro ne partoprenas tiujn plezurojn, kiuj ekzistas por fremduloj kaj ankaŭ por riĉaj sentaŭguloj kaj plutokratoj; sed ne por malriĉaj venontaj... kongresanoj.

La bildo de Parizo ne estus tuta, se mi ankoraŭ ne menciis pri la bone konataj el francaj romanoj kaj filmo — apaŝoj. Sed tiuj apaŝoj aspektas alie ol ili, kiujn ni konas el literaturo. La nunaj parizaj apaŝoj estas elegantaj sinjoroj, same kiel apaŝinoj kaj ili kolektiĝas en specialaj kafejoj (**Bal Musette**) en urbkvartalo Paname (Montmartre), kien la fremdulo ne devas eniri. La nunaj apaŝoj estas ĉielaj birdoj, kiuj vivas kiel birdoj — ĉar neniu konas ilian „oficialan“ okupon — ili havas multajn okupojn — sed la ĉefa okupo estas amo, danco kaj vino. La apaŝoj formas specialan tre interesan kaston kun originalaj kutimoj kaj propra leĝaro. Ilia aventurplena vivo inspiris jam multajn romanverkistojn por priskribi ĝin.

Tamen tiu urbo de lumo ne estas nur ejo de sola feliĉeco kaj amuzo! Bedaŭrinde — nenie estas tiom da kontrastoj kiel ĉi tie. Flanke de riĉa, senzorga, diboĉa pariza vivo, proksime de grandegaj palacoj, luksaj hoteloj kaj kafejoj lumigitaj per mil efektplenaj lumreklamoj — inter senfina ŝnuro de aŭtomobiloj — oni vidas ĉiupaŝe la mizerulojn, senhejmajn malriĉulojn, kiuj loĝas sub pontoj de Sekvano aŭ en aziloj, rifuĝejoj kaj kiuj sin nutras per restaĵoj en grandegaj haloj...

Sed tiun grandan mizeron la fremdulo ne vidas aŭ ne volas vidi...

Oni povus ankoraŭ longe kaj multe rakonti pri la urbo de lumo, kie la nunan jaron okazos la **XXIV-a** Konreso de Esperanto, sed la

plej elokventa priskribo ne povas doni la veran bildon de tiu mondurbo, kies rememoron mi konservas ĉiam tiel vive en mia kapo kaj... koro.

Se vi volas konvinkiĝi, ĉu mi ne trograndigis en mia priskribo la belecon de ~~Parizo~~ veturu grandare al tiu ŭnika urbo, al pariza Kongreso kaj vi neniel plendos je tio. Viaj esperoĵ ne elrevigos Vin. — Do ĝis la revido en Parizo!

FLORETO.

dediĉita al samideano Ju-Lik.

Jen staras sur bordo
De bela arbar'
Malgranda floreto
Inter foliar'.

Karesas ĝin vento
Kaj kisas la sun'.
Ĝin lavas la roso,
Vespere la lun'.

Salutas ĝin kore
Kaj flustras al ĝi:
„Ho, kara floreto,
Mi estas kun Vi“.

Ĝin vekas mateno
En bela purpur'.

Lulkanton vespere
Kantetas natur'.

La steloj ĝin gardas
Dum nokta silent',
Mallaŭte eĉ fluas
Rapida torent'.

Do gaje, tre gaje
Ridas la floret',
Ĉar amas ĝin ĉiuj,
Sun', lun', stel', ventet'...

Floreto tre ĝojas
Inter foliar'
Kaj ĝia ridado
Sonas en arbar'.

Halina Weinstein.

ZYGMUNT LITYNSKI.

LA ĴURNALISTO.

Se ĝi estas eĉ vero, ke ekzistas ankoraŭ aferoj, pri kiuj filozofoj ne songis — tiam ili demandu pri tio la ĵurnalistojn. Ili songis jam pri ĉio. La mond' estas por ili granda leksikono sen iuj ajn misteroj. Ĉar, se por la filozofo la scio estas idealo, por la ĵurnalisto ĝi estas nur devo. La filozofo serĉas veron konsciante, ke li ĝin ne trovos: la ĵurnalisto — li provu ĝin ne trovi — tuj estos elĵetita el la redakcio.

„Vero“ estas cetere ideo sufiĉe nedifinita. Por la ĵurnalisto ĝi estas ĉio, kio povas efektiviĝi; kaj ĉar estas malmulte da aĵoj, kiuj ne povus iam efektiviĝi — tial do la ĵurnalisto naĝas en vero kvazaŭ en lago.

Tamen, kiel ni scias, ne ĉiu vero havas gravecon. Vero por fariĝi materialo de l' ĵurnalisto devas respondi al kelkaj kondiĉoj. Antaŭ ĉio ĝi devas esti neverŝajna. Ekzemple provu iu gazeto pruvi en la plej prudenta maniero, ke $2 \times 2 = 4$. Ni opinius tion ŝerco. Kaj la pruvo estas ja malfacila kaj nur malmultaj scipovas ĝin entrepreni. Tamen la sama gazeto anstataŭ la ĉefartikolo presigu nur jenon: $2 \times 2 = 100$ dolaroj. Ne-nion plu. Sen iu pruvo. Post unu horo ni disaĉetos la tutan eldonon, ne pensos, nek parolos pri io alia, nur ni multobligos, multobligados... Morgaŭ sufiĉos informi, ke kelkaj pli fervoraj abonantoj solvis la problemon, kaj publikigi iliajn fotografaĵojn.

Erarus la supozanto, ke „neverŝajna vero“ devas esti nepre nova. Jen ekzemple, bone konatajn informojn pri tio, ke iuloke naskiĝis bovido kun du kapoj, aliloke bovo ekparolis aŭ ie iu faris oron el sablo, ni trovas en la sama formo jam en la romaj Annaloj. En tiu revuo ili troviĝas eĉ tiel ofte, ke malgraŭvole fiksiĝas en ni la konvinko, kvazaŭ en la tempoj de Cezaroj ĉiu bovido estis dukapa, bovoj parolis latine kaj ĉiu sablo en Tibro ŝanĝiĝis je l' oro. Tio pruvas la grandan influon, kiun la ĵurnalaro havas je nia intelekto, kaj kies bonfaroj fariĝas ĉiutage pli videblaj.

La rolon de intelekta gvidanto, kiun kune kun la funkcio de ĉefredaktoro, ludis iam **Pontifex Maximus** mem, prenis hodiaŭ l' anonima ĵurnalisto. Nevidebla, kaŝita en telefona kamero en alia mondparto, li flustras en niajn orelojn vortojn, kiujn ni post momento ripetas kiel niajn proprajn; li sufloras frazojn, kiuj neniam venus al ni en la kapon; li elprenas, parton po parto, niajn senhelpajn cerbojn, anstataŭante ilin per siaj universalaj formuletoj. Dank' al li la mistera mondo fariĝas tiel malgranda, ke ĝin oni povas preskaŭ kunfaldi kvarope kaj enmeti en la poŝon. Tiel de nun ker' dankoplena ni levas al stelkovrita ĉielo l' okulojn kaj dankas la Providencon, ke ĝi permesas al ni scii, kiel staras **Royal Duth** sur la Chicago-borso kaj po kiom oni vendas la haringojn en Amsterdam.

Rasan ĵurnaliston ni rekonas jam je l' unua rigardo: memfida, eleganta, okulvitroj en korna kadro, striita pantalono kaj lakŝuoj. Al tio aliĝas plej ofte longa, iom kurba nazo. Tiu ĉi nazo, krom funkcio dekora, estas ekstreme helpa en la profesia laboro. Oni diras, ke la ĵurnalisto „flaras“.

Flari oni povas ĉie. Flari oni povas nur tie, kie io malodoras. Tio estas la ŝatataj lokoj de rasa ĵurnalisto. — Ĉie, kie io putras, io difektiĝas, unuvorte, kie „odoras kadavre“ — li estas la unua. Dum tio li pasiĝas tiom da tempo en diversaj lokoj de krimo, ĉe distrancitaj kaso, en punjuĝejoj kaj policaĵ komisarieroj, ke malgraŭvole li prenas sur sin la funkcion de ligilo inter la kriminalistoj kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne sidas — proksimigante ilin al si kaj formante fine el ili unu grandan rondon familian.

Tamen la plej stranga estas l' animo de l' ĵurnalisto. La ĵurnalisto, precipe tre juna, havas iafoje belan animon. Kun senzorga malavareco li eltiras el ĝi misteron post mistero, sopiron post sopiro, por miksi ilin kun adjektivoj kaj tripunktoj kaj formadi ĉarmajn artikolojn. Tiuj artikoloj iras unu post l' alia en la korbon kaj kune kun ili — ankaŭ l' animo de l' ĵurnalisto. Kaj ne pli frue ol kiam elĉerpiĝis la lasta mistero kaj la lasta sopiro, kiam ekmankis jam adjektivoj kaj tripunktoj — oni donas al li la revatan membrokarton, parolas, ke el li fariĝos io, kaj ordonas veturi en la mondon.

Depost tiam la ĵurnalisto ĉesas pensi kaj ĉesas senti. Restas al li sole ambaŭflanke de l' nazo du grandegaj okuloj kaj ambaŭflanke de l' kapo du ankoraŭ pli grandaj oreloj. Kio antaŭe estis lia propra animo, tio nun estas miksaĵo de centmil fremdaj animoj reduktitaj al komuna denominatoro. Li ne plu vidas la homojn, objektojn kaj okazojn. Li vidas l' artikolojn. — Li iras la straton kaj rigardas: jen propra telegramo, tie originala korespondajo, tie ĉi kaj ie kelkaj komunikaĵoj. Jam li estas

enironta en aŭtobuson, kiam subite aŭdiĝas krio, konfuzo, alkuras la policianoj kaj sur l' asfalto kuŝas sanganta kroniko de l' tago.

Li proksimiĝas surfingre, kliniĝas, dezirus tuŝi per la mano, dro-nante en muta admiro; poste li kuras kvazaŭ freneza por sendi per la plej proksima poŝto al la redakcio la varman ankoraŭ homan malfeliĉon, po dudekkvin groŝoj por linio.

Iun tagon aperas ankaŭ al li la plej neverŝajna el ĉiuj veroj. Li faletis — kaj subite de sia kapturna altaĵo falas tuj en la mezon de lino-tipoj, kiuj faras de li malgrandan, sensignifan nekrologon.

Super lia tombo estos frapantaj nokte la skribmaŝinoj. La vento disĵetos, anstataŭ la folioj, milionojn da nigreblankaj vortoj.

Esperantigis Baroko.

JOHANO WOLFGANG GOETHE.

(Okaze de centjara morttago de poeto 1832—1932)

Antaŭ cent jaroj la 22-an de Marto 1832 mortis en Wejmaro (germanujo) unu el plej eminentaj poetoj de l' mondo J. W. Goethe. Lia vivo kaj lia verkaro — formante belan kaj harmonian tutajon — estas la kvintesenco de la spirita „eŭropeco“ kiu ĝenie unuigas apolinan klarecon de antikva kaj ĉemediteranea kulturo kun profundeco de germana penso. Do li apartenas ne nur al germana nacio, sed li estas ankaŭ vere internacia poeto de la tuta homaro, simile kiel la grandaj poetoj ekz. Homero, Dante, Ŝekspiro, Byron k. a.

La ĉefverkoj de Goethe, kiel ekz. grandioza epopeo „Hermann kaj Dorotea“ aŭtobiografia romano „Werter“ — dramoj: „Ifigenio en Taŭrido“ — „Egmont“ — „Torquato Tasso“ — kaj antaŭ ĉio la plej granda ĉefverko, mirinda tragedio „Faŭsto“ same kiel la lirikaj poezioj ne maljuniĝis kaj restis ĉiam aktualaj kaj vivaj.

Kiam granda „Olimpulo“ revis pri la „mondliteraturo“ (Weltliteratur) kiu devis kunpreni la plej belajn tradukindajn verkojn de ĉiuj nacioj — tiam ne ekzistis ankoraŭ la internacia neŭtrala lingvo, kiu antaŭ ĉio taŭgas por krei tiun „mondliteraturon“ de bonaj diversnaciaj tradukoj. „Esperanto“ efektivigis revon de genia poeto — tradukinte la plej belajn kaj interesajn verkojn de multaj nacioj. Kaj tio certe ne estas nur hazardo, ke la unua traduko esperanta estis la dramo de Goethe: „La gefratoj“ (die Geschwister) kaj ties tradukinto estis Polo: A. Grabowski.

Tiamaniere Goethe, la genia vere internacia poeto de la tuta homaro fariĝis patrono de la esperanta „mondliteraturo“. Oni ne devas forgesi, ke ankaŭ nia majstro tradukis alian ĉefverkon de genia poeto nome: „Ifigenio en Taŭrido“ kaj tiu traduko estas unu el plej belaj kaj kongeniaj tradukoj esperantaj.

Por la kulturo de l' mondo la rolo de la grandioza poeto ankoraŭ ne komenciĝis, ĉar en lia verkaro kaj en lia vivo estas eternaj valoroj, kiuj estos atingeblaj ne pli frue, ol en estonta espereble esperanta... **Pan-eŭropo.**

La „idealo“ de Goethe estis antikva. Li nome estis la reprezentanto kaj fervora apostolo de „humanismo“ kaj de „pura homeco“ t. e. de tiu nobla individualismo, kiun kreas nuntempe „kolektivo“ kaj „amaso“.

„La senco kaj signifo de miaj verkoj kaj de mia vivo — li skribis — estas la triumfo de pure homa elemento“. (Triumph des Reinmenschlichen).

Ĉe neniu el aliaj plej grandaj poetoj la genia arto, universa scienco kaj bela vivo unuiĝis tiel harmonie kiel ĉe aŭtoro de „Faŭsto“.

Tiuj, kiuj lin konis dum lia vivo, asertas, ke Goethe estis en sia vivo eĉ pli granda artisto ol en sia poezio.

Dum sia longa, laborema kaj poeziplena vivo li restis ĉiam fidela al tre altaj idealoj de vivo kaj, kvankam li estis la plej nobla individualisto, kaj la zorgon pri la spirita evoluo de sia propra personeco li traktis kiel la plej gravan aferon kaj sian devon — tamen la fina celo de liaj prometeaj bataloj kaj faŭstaj penadoj estis — kiel ĉe Faŭsto — la feliĉo kaj bono de la tuta homaro.

Per sia „Faŭsto“ per tiu verko de lia tuta vivo troviĝis Goethe en vico de plej eminentaj kreantoj de l' mondo flanke de Homero, Dante kaj Ŝekspiro.

TADEUSZ BILIŃSKI.

J. W. GOETHE.

„SUPER ĈIUJ MONTJOJ...“

(Ueber allen Gipfeln)

Super ĉiuj montoj
Silent'
En ĉiuj arbpintoj
La vent'
Sentiĝas

La birdoj en arbar' silentas
Atendu nur, baldaŭ
Ripozos Vl...

tradukis T. Biliński.

LA KONGRESKONDIĈOJ.

Korekto.

Al la artikolo „La kongreskondiĉoj“ en nia numero 1-a la direktoro de ICK en Genevo skribis al ni laŭjene:

Bonvolu afable korekti preseraron, kiu enŝoviĝis en la 6-an alineon de la respondo de nia prezidanto s-ro Merchant. La lasta frazo de tiu ĉi alineo devas teksti: „Estas en la intereso de la L. K. K. (ne ICK, kiel presite) mem, mastrumi tiel, ke ĝi povas uzi la garantion por postkongresaj laboroj“.

En la artikolo estas erare presite „la ICK“, kiu tute ne partoprenas en profito el la garantio, kiu estas eksterbudĝeta, netuŝebla sumo, je ekskluziva dispono de la LKK.

Ni ankaŭ devas kontraŭdiri, ke la artikolo konfirmas kian ajn nenormalecon de reguloj kaj kongreskondiĉoj. Ĉiu inteligenta leganto tuj ekvidos, ke s-ro Alfus en sia postparolo tute pretervidas la logikon de la respondo, ke „sistemon mem oni ŝanĝas nur en kazo de neceseco post tre prudenta ekzameno sur bazo de spertoj“. Ke formala ŝanĝo de regulo estas antaŭvidita, neniel pruvas ian nenormalecon, ĉar ne la teksto de regulo estas decida, sed la maniero laŭ kiu ĝi estas aplikata.

Ke la ekzistantaj reguloj estas aplikataj bonorde tiel laŭ vidpunkto de juro, kiel de moralo, pruvas la respondo de nia prezidanto.

LINGVAJ DISKUTOJ EN ARNHEMO.

La Internacia Cseh-Instituto de Esperanto invitas al partopreno en lingvaj diskutoj, okazontaj sub titolo — „I-a Internacia Lingva Konferenco“ en la Esperanto-Domo en Arnheмо dum pasko (25.—29. 3.) nunjara. Celo estas:

1. Diskuti pri la lingvaj problemoj de Esperanto, komparante la spertojn de diversnaciaj uzantoj de nia lingvo.

2. Kolekti materialon informan por la lingvaj institucioj (spertoj, bezonoj kaj deziroj de la publiko uzanta Esperanton).

3. Fari rezoluciojn kaj deziresprimojn transdonctajn al la Akademio por pristudo kaj efektivigo.

4. Doni okazon al persona kontakto inter la Esp.-lingvistoj.

La diskutoj okazos sur la bazo de enkondukaj referaĵoj, farotaj de eminentaj kompetentuloj.

Partopreni povos ĉiu esperantisto; la partoprenontoj loĝos en la hotelo de la Esperanto-Domo. Partoprena kotizo 4 nederl. guldenoj. Loĝkosto (plena pensio) por ĉiu tago 3.25 ĝis 4.25 guld.

Post la konferenco, dum la tagoj de 30. 3. ĝis 3. 4., okazos en la Esperanto-Domo t. n. „Paska Universitato“, kun prelegoj de eminentaj esperantistoj.

Pluajn informojn kaj detalajn programojn petu de: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.

LETERO EL DANLANDO.

Tre ŝatata samideano sinjoro Profesoro Bujwid!

Mi ricevis la jarkolekton de „Pola Esperantisto“ kaj diras plej koran dankon! Car ĝi ne nur revokis la belajn memcrojn pri via bela kunesto kun ni, sed ankaŭ donas valorajn sciigojn pri aferoj, pri kiuj nia malgranda „Dansk Esperanto Blad“ ne povas raportii: Ekzemple la artikolon „Minacas krizo“! Ĉu ne la plej senpera vojo estus, ke la landa organizacio — ĉiulande — pace almitu ĉiujn popollernejajn Instruistajn Seminariojn? ICK devus organizi la aferon per speciala „Internacia Komisiono por enkonduko de Esperanto en la Seminariojn, komisiite de ICK“. La komisiono unue ellaborus propagandkajeron destinitan nur por instruistoj; aŭ pli bone du kajeretojn: unuan kun la ĝeneralajoj, ne speciale instruistaj; kaj duan kun la specialajoj. Por la proksimaj jaroj oni limigus la aranĝon al ok ŝtatoj: Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Nederlando, Danujo, Svedujo, Norvegujo, Finnlando, Svisujo. Sufiĉus, se parto de la seminariistoj ne — oficiale, do privatvoje sen necesa permeso de l' aŭtoritatoj, lernas Esperanton. Samtempe la preŝita materialo estos disponata al la instrugazetcoj de la ok landoj.

Nia grupo enmembrigis 8 novajn Esperantistojn kaj du pasivajn membrojn. En oktobro ni havis la en tiu ĉi jaro duan Ĉe-kurson de „Ajo“, kaj nun s-ro Kienert kaj mi gvidas progresigan kurson por 12 anoj (inkluzive mia edzino). Mi ankaŭ gvidas la konversacian kurson. Ajo nun kursigas en Aarhus, poste en Hobro, Aalborg, Tylstrup (plej norde). Ni havis apartan kurseton de Ajo por tri policistoj. — En Kolding fondiĝis „Kolding Esperantoforening“ kaj „Kolding Politi Esperantoforening“.

Kun la plej amikaj salutoj via Goedecke.

PUBLIKA DISKUTADO PRI LINGVO INTERNACIA EN KARVINA.

Unuafoje en nia regiono okazis publika diskutado pri lingvo internacia, alirebla al ĉiuj simpatiuloj kaj kontraŭuloj de la lingvo internacia. La kunveno, organizita de du neŭtralaj kultursocietoj: la pola kleriga komisiono kaj la memeduka rondeto de „Macierz Szkolna“ (Lerneja Societo) en Karvina, estis vera manifestado de konkordo kaj frateco. Preskaŭ 200 partoprenintoj aŭskultis kaj parte ankaŭ aktive partoprenis tre interesan, kaj viglan interŝanĝon de opinioj. La kunvenon prezidis distrikta popollerneja inspektoro P. Rakus (neesperantisto), kiel sekretario funkciis instr. A. Szurman (neesper.), kiel ĝenerala referanto R. Kobiela, konsuleja oficisto. Sur la tribuno aperis kelkaj eminentaj ekspertoj kaj konantoj de la pridiskutata problemo. La unua parolanto estis Jarosław Waleczko, redaktoro de la pola gazeto „Prawo Ludu“ el Ĉesky Têšín (neesperantisto), kiu prezentis laŭ sia vidpunkto la problemon de lingvo internacia, deklarante, ke esperanto estas la plej taŭga solvo de tiu ĉi demando. La sekvanta oratoro, pastro K. Maultz atentigis, ke la latina lingvo ne kapablas esprimi ĉiujn modernajn ideojn kaj tiel esperanto estas preferinda. Parolis ankaŭ s-ano Pończa (pollingve)

pri la celo de lingvo internacia, s-ano Hladk'y je la nomo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (ĉehlingve) kaj s-ano Krysta, kiu alportis la salutojn de la Pollanda Esperanto-Delegitaro kaj reprezentis la Regionan Esper. Ligon. Lian belan esper. paroladon tradukis lerte kaj bonege s-o R. Z. Kobiela. En la sekvinta libera diskutado partoprenis kelkaj pluaj intersemuloj. Grava fakto estas, ke ĉiuj, esperantistoj, kaj neesperantistoj rekonis la urĝan neceson de lingvo internacia kaj esprimis sin por esperanto. Ĉiujn opiniojn resumis mallonge la ĝenerala referanto, kiu konstatis, ke ĉiuj parolantoj, reprezentantoj de diversaj partioj kaj de tri naciecoj konsentas tamen en unu punkto: ke esperanto estas la plej bona kaj definitiva solvo de la problemo pri lingvo internacia. Li proponis sekvantan rezolucion:

La partoprenantoj de la publika kunveno pri lingvo internacia, kunvokita de la Pola Kulturkleriga Komisiono kaj la Memeduka Rondeto de „Macierz Szkolna” en Karvina, konatiĝinte kun la koncernaj opinioj de reprezentantoj de plej diversaj politikaj direktoj kaj de tri naciecoj, — konsideras necesa kaj utila la adopton de unu helpa lingvo internacia, kiu fariĝus dua lingvo de ĉiu civilizita homo. La partoprenantoj deklaras, ke la plej bona kaj taŭga solvo de la problemo pri lingvo internacia estas akcepto de esperanto, — invitas ĉiujn societojn kaj organizaĵojn, ke ili kuraĝigu siajn membrojn kaj simpatiantojn al la lernado de esperanto, — adresas al la lernejoj aŭtoritatoj kaj lernejestroj la peton, ke ili en la kadroj de la ekzistanta lerneja leĝdonado akcelu la enkondukon de esperanto en la lernejojn kiel nedeviga fakto.”

Tiu ĉi rezolucio estas akceptita unuanime. Je la 17 1/2 s-o insp. fermis la kunvenon. Estas certe, ke tiu ĉi sukcesplena publika diskutado grandmezure kontribuos al la disvastigo de esperanto en Karvina (plej granda mineja komunumo en Silezio) kaj la ĉirkaŭaĵo.

POLLANDA KRONIKO.

BYDGOSZCZ. La monata kunveno de **Scienca Esperanta Rondo**, kiu okazis la 27-an de januaro 1932 en Ŝtata Gimnazio Klasika, estis tre bone vizitata. S-ro Krzysztofowicz Włodzimierz parolis tre interese pri la temo: „V. N. Devjatnin”, kiu estas unu el la unuaj Esperantaj pioniroj. Krome S-ro Fethke Stefan havis interesan paroladon kun du geografiaj skizoj pri: „La naskiĝo de la kontinentoj kaj oceanoj”, laŭ la nova teorio de prof. Wegener. Krome partoprenis F-inoj: Krawczykówna Julja (fortepiano), Rossówna Ilza (violono), Zirklerówna Herta (fortepianakompano), Górska Benedykta (deklamo). La ĉeestanta negra samideano Kola Ajayi kantis je insistaj petoj de la aŭskultantaro, afrikajn kantojn. La kunvenon malfermis interesa parolado de prof. Sygnarski Mieczysław pri la laboro en Scienca Esperanta Rondo, disvolviĝo kaj sukcesoj de Esperanto en Bydgoszcz. Esperanton instruas prof. Sygnarski en: 1) Ŝtata Klasika Gimnazio, 2) Ŝtata Humanista Gimnazio, 3) Urba Komerca Lernejo, 4) Komerca Liceo laŭ Ĉe metodo al ĉirkaŭ 300 lernantoj. Krom tio por la publiko gvidas prof. Sygnarski elementan Ĉe-kurson kaj S-ro Fethke Edmund superan kurson, bazitan sur Ĉe metodo. Ambaŭ Esperantaj grupoj eldonas monatan gazeton: „Ligilo” en kiu oni informas la Bydgoŝĉajn Esperantistojn pri tuta Esperanta movado en Bydgoszcz.

La januaran kunvenon de „Societo Esperanto” ĉeestis ĉ. 150 personoj. La ĉefan paroladon pri: „La Esperanta Domo en Arnhem” havis fraŭlino Ezopówna en bonega klara lingvo. Grandan intereson elvokis la parolado de Negro-Esperantisto Kola Ajayi el Lagos. Brita Okcidenta Afriko. Li kortuŝe parolis kaj promesis fariĝi „Apostolo de Esperanto”. Poste li kantis originalajn afrikajn kantojn. La ĉeestantoj dankis al li per tondra aplaŭdo. En la programo krome partoprenis: s-ro Pankratz dezirante feliĉon al forveturanta Jean Forge, s-ro Prengel varbante por UEA, s-ro Forge adiaŭante siajn kursanojn, f-ino Górska kun deklamo, s-ro Kłodziński kun humora paroladeto. Krome komunaj kantoj.

DĄBROWA GÓRNICZA. La 13 de februaro, grupo „Tagiĝo” aranĝis akademion okaze de sia 4 jara ekzistado kun jena programo: prelego j. t. Amikeco inter la esperantistoj; viva gazeto kaj letervespero. Ĉeestis 120 personoj. Bele ilustritaj kaj riĉenhavaj korespondadoj (26 p. k. el 14 landoj) elvokis grandan intereson. Modela viva gazeto trovos multajn imitintojn inter aliaj grupoj.

KRAKÓW. Kun plezuro ni konstatas, ke la krakova esperantistaro ne nur laboras, varbas, kaj propagandas, sed ankaŭ amuzas sin, babilas, ludas kaj dancas. La tutmonda krizo forrabis de ili nek humoron, nek fervoron. Pruvus tion la multnombraj okazintaĵoj dum sufiĉe mallonga tempo nome: la tradicia, bonege sukcesinta Zamenhofa espero, okazinta samtempe kun la 25-jara ekzisto de nia

Societo. La riĉa programo, kiun plenumis la prelegoj de Prof. Bujwid, Ing. Thor, ing. Kostecki, la belegaj „Prologo” de f-ino Szczepańska kaj la „Epilogo” verkita de f-ino Ĉwiklińska entuziasmigis ĉiujn. Menciinda estas ankaŭ la bele ilustrita prelego de s-ro Steiner. Antaŭ niaj okuloj montriĝis la rava ĉefurbo de Aŭstrujo kun siaj monumentoj, konstruaĵoj kaj teatroj, dume la oreloj ĝuis la ĉarman vian muzikon.

La laste okazinta dancvespero kunvenigis multajn homojn; gaje kaj vivplene aspektis nia anaro en la bele ornamita verdstela dancejo. — La vesperon honoris per sia ĉeesto nia kara kaj estimata „aveto” prof. Bujwid. — La „Gaja Vespero” (29. II.) estis sincere aplaudita. Grandan impreson faris la „Presejo” de ing. Gostyński, novtempa plenritma propaganda verketo — intervjuo inter la poeto kaj esperanta presmaŝino. — Sur fono de bela kaj tre originala dekoracio, imitanta presmaŝinon, la „hom-preseroj” deklaris: Neniĉ, Nenie, Neniĉ, Neniĉ” perfidi nian karan lingvon — je granda ĝojo de la poeto kaj entuziasmo de publiko, kiu per sia sincera aplaŭdo konfirmis tiun-ĉi promeson. — Samvespere la unua depost multaj jaroj okazinta „Verda Kabaredo”, aranĝita kaj verkita de f-ino Szczepańska, gajigis ĉiujn. — Uzante la melodiojn de iom malnovaj kupledoj oni plenumis kaj lerte prikantis la ecojn de niaj estimataj estraranoj. — Kiu do povis ne ridi, aŭdante la preskaŭ ĉiam trafan kaj spritan „prijugon” kaj vidante la konfuzitan penantan ridi vizaĝon de l’ „akuzito”. La ceteraj ĝojis tiumomente esti neestraranoj. La programon de tiu vere gaja vespero kompletigis la ŝercaj rakontoj „pri distritaj profesoroj”... de s-ro Hodakowski kaj bela pianludo de ĉarmaj f-inoj Rothówna kaj Rudnicka, krome la deklamadoj de s-roj Kriss kaj Ortsmann. — Konferencis f-ino Szczepańska. — Ĉiusemajne la esperanta „Societo” aranĝas fakajn prelegojn, gvidatajn de s-roj prof. Biliński, dr. Blassberg, dir. Kuhl, dro. Żupnik ktp. Unuvorte la krakova esperantistaro ne dormas, sed minacas nur danĝero, ke ĝi infektos la „malviglan dormantan” Krakovon.

LUBLINIEC. (Oblata Esperanta Rondo) En nia Kolegio la „Verdstela Vivo” jam bone evoluas! La membroj (ĉirkaŭ 25!) elektis la 31. I. 32 jenan estraron: prezidanto H. Paruzel; vicprezid.: T. Jaronim; sekretario: A. Bednorz, vicsekr.: R. Woryna; bibliotekisto: B. Kopeć. Oni kunvenas ĉiujaŭde k. dimanĉe, pritraktas esperantan literaturon kaj akceptas k. respondas ĉiujn korespondajojn.

I. O. M. I.

LWÓW. Post dumonata lernado finiĝis sukcesplene komencaj kursoj gvidataj de fervoraj gesamideanoj f-ino Nadel, s-anoj Herr, kaj Zieliński. Nuntempe komenciĝis du novaj kursoj. Kurso por komencantoj de f-ino Nadel kaj supera kurso gvidata de Magistro Schapira. Partoprenas pli ol 40 personoj. — Krom tio, nia unua, kaj sola en Lwów Ĉe-instruisto s-ano Herr, komencis gvidi la kurson ĉe Komerca Ekonomia Lernejo (Szkoła Ekon. Handlowa) por 15 personoj. — Dank’ al tiuj ĉi kursoj, la Esperanta movado ĉe ni lastatempe tre vigliĝas. Dum niaj ordinaraj kunvenoj en klubejo estas ĉiam plene kaj gaje dum afablaj esperantaj interparoladoj kaj rakontoj rapide pasas la tempo.

Grandstila Zamenhof-vespero kaj jubileo de 25 jara fondo de „Lvova Societo Esperanto” okazis la 15. XII. 1931 en festa Salono de „Industria Instituto”. La riĉa programo ampleksis paroladojn de D-ro Fels kaj S-ro Schnützer, esperantlingvaj deklamoj kaj kantoj, ludoj de militista muziko kaj konataj artistoj. Ĉiuj prezentantoj rikoltis grandan aplaŭdon. La bela vespero estis honorigita de multaj ŝtataj kaj urbaj eminentuloj. — Post unu semajno la tuta soleno estis disaŭdigita per radio por tuta Polujo. — Nune renoviĝis vigla movado en nia Societo. Okazas regulaj kunvenoj de la membroj kaj kursoj gvidataj de lerta, fervora, samid. F-ino Nadel kaj S-roj Herr, Szapira kaj Zieliński.

POZNAŃ. En la jurnalo „Nowy Kurjer” aperis tre interesa artikolo de s-ro dro Henryk Ułaszyn, prof. de ĉi-tiea universitato. La artikolo, tre objektivite verkita, pledas por Esperanto.

SOSNOWIEC. Kun permeso de distrikta lernejspektoro, kiu dissendis koncernan cirkuleron al ĉiuj lernejoj, sukcesis ĝis nun en 5 popollernejoj komenci porinfanajn kursojn, kiujn partoprenas 236 geinfanoj kaj kelkaj geïnstruistoj. Instruas s-ro Jozefo Goldfarb laŭ Ĉe-metodo.

Ankaŭ komenciĝos baldaŭ kurso por instruistoj. Esperantistoj! Grupoj! Oficialuloj en tuta mondo! Helpu venki ke sekvontjare jam oficiale okazu la instruado! Sendu grandnombre dankleterojn al s-ro lernejspektoro Luchowiec sub adreso: Inspektorat Szkolny, Sosnowiec — Polujo, ul. Małachowskiego 22. Sendu ankaŭ ekspozicimaterialon al s-ro J. Goldfarb, Sosnowiec, ul. Wiejska 2.

Kurso por komencantoj finiĝas kun 22 personoj, nova komenciĝos. Daŭriga kurso kun 26 personoj funkcias. Instruas s-ro J. Goldfarb laŭ Ĉe-metodo. —

Veturante de Tallinn al Parizo, interrompis s-ano J. Baghy sian vojaĝon por viziti tie s-ancn J. Goldfarb, malnovan amikcn sian kaj restis en nia urbo de 22-a—24-a II. — Dum sia dutaga restado honorigis nia fama poeto-verkisto la superan kurson de s-ano J. Goldfarb, kie li per deklamado de kelkaj siaj poemoj entuziasmigis la aŭskultantaron.

SZOPIENICE. Finiĝis publika kurso kun 12 partoprenintoj kaj en magistrato specialkurso por la oficistoj kun 14 pers. La lastan partoprenis ankaŭ s-ro komunumestro J. Michna kun edzino. Alia specialkurso por policistoj kun 14 partoprenantoj ankoraŭ daŭras. Partoprenas ankaŭ s-ro komisaro Witala. Instruisto en ĉiuj tri kursoj s-ro J. Goldfarb laŭ Ĉe-metodo.

WILNO. La esperantista grupo ĉe la Vilna Juda Landkonema Societo aranĝis la 29. II. 32 Solenan Esperantan propagandan Vesperon, kiun vizitis ĉ. 300 pers.

La programo estis jena:

- 1) Solena malfermo kun esp. **himno**.
- 2) Propaganda prelego de Dro Goldburt pri la signifo kaj valoro de Esper. kaj S-ano S. Ŝik pri la ĝisnuna granda sukceso de Esperanto.
- 3) Salutis: S-ro Dro Gurviĉ, S-ro Landau, Kamieniecki, Gitelman, kaj S-anoj S. Ŝik kaj Lifszyc.

Leterajn salutojn sendis D-ro F. Zamenhof, U. E. A. (J. Ŝapiro ĉefdeligito); D-ro L. Dreher; Lejzeroviĉ (traduk. „Dibuk“) F. Hiller kaj Varsovia Esper. Akad. Rondo.

Scenoj de „Ho, tiuj fremduloj“ de F. Hiller kaj „Dibuk“. La prezentadon plenumis la teatra studo ĉe la societo sub la arta gvidado de s-ro R. Koĉerĝiński kaj sub la Esperanta gvidado de S-ano S. Ŝik. — Diversajn esper. kantojn plenumis f-ino S. Minkoviĉ kaj S-ano A. Gajfen. — La esper. grupo ĉe societo aranĝis ankaŭ riĉenhavan esper. ekspozicion kun ĉ. 800 Esperantaĵoj laŭ 30 specialaj fakoj.

WŁOCŁAWEK. La 11-an de febr. komenciĝis senpaga kurso de Esp. aranĝita de Asocio de pola instruistaro. La kurson antaŭis solena programo kun prelegoj kaj kantoj.

RECENZOJ.

FUNDAMENTO DE ANIMO de Onisabro Deguĉi.

La propaganda oficejo de „Oomoto“ eldonis malgrandan broŝuron: „Fundamento de animo“. Ĝi estas aparte presita, aldono de la „Rakonto el la Spirita mondo“, la plej sankta libro de la Oomotanoj. — „Fundamento de animo“ prezentas priskribon de la postmorta vivo de l' homo, laŭ la kredo de l' Oomotanoj. Sed oni tute ne povas diri, ke ĝi estas scienca verko, plie ĝi estas konsiderinda, kiel eta rakontaro, kelkfoje kolorita de filozofiaj traktatoj, sed tute facilstila kaj komprenebla.

La enhavo estas alloga, ĉar temas pri tre interesa problemo. **Generale ĝi estas jena:**

La dumviva konduto de l' homo decidas pri lia postmorta sorto. Se la homo vivas surtere pie kaj morale, kun amo kaj kredo al Dio, tiam postmorte li iros ĉielon. Kontraŭe, se li vivas malmorale kaj peke, se li dubas Dion, li pretigas al si la inferajn turmentojn.

— Tre interesa estas priskribo de la ĉiela vivo. Ekzemple tiel mirinda afero:

Sendepende de la aĝo de l' mortinto, la ĉieliranta animo tute juniĝas: la viro aspektas ĉiam tridekjara, la virino dudekjara.

La vivo en ĉielo estas tre simila al tiu sur tero, sed multe pli feliĉa kaj plezur-dona. La komunikigo de la ĉielanoj kun la teranoj okazas pere de medioj! — Denove interesega aserto!

Mi devas konfesi, ke kvankam mi tre malmulte ĝis nun interesiĝis pri la postmorta vivo, tamen mi tralegis tiun libreton, kun vera plezuro, kaj mi rekomendas ĝin al ĉiu „spiritulo“.

F. Birkenfeld.

KOLOMAN KALOCSAY: Rimportretoj. Eldonis: Literatura Mondo, Budapeŝt.

„Kalocsay — mondvoĉa bardo, reĝo de l' ritmo kaj rimo“, estas enplektinta en nian literaturkronon ankoraŭ unu floron, verkinte libreton, en kiu li pentris galerion de esperantaj steloj „al kiuj firme sin apogas la Esperanta bastion“.

„Persono sekvas post person“, kaj ĉiu el ili estis karakterizita de l' aŭtoro per majstra trafeco, kies ecoj estis admirinde kaptitaj.

Kalocsay „miksitis kun artlerta kribro sur sorĉa flam' per jongla man' likvo-rojn dolĉajn al ĉampan', kaj sprita spic' kaj pika pipro“.

Nur kelkajn personojn mi specifu (estas kvindek sep steloj!) — mi nomos nur kelkajn plej konatajn.

Jen Julio Baghy „homo homa, homecon serĉas malespere“, jen nia kara profesoro Bujwid, kiu „kun monde fama scio, prelegas kaj eksperimentas. Ke por ni agas li kaj sentas, fieras rajte Polonio“.

Kiu ne konas la Gajan Stelon, migrantan lingvan apostolon, pastron Andreo Ĉe, kiu ne legis dum unu sido verkojn de Jean Forge — „Tekniko kaj Rapid', moderna vibro, aŭto, kino, abismoj de la homa sino“?

Jen Hans Jakob, mastro de U. E. A. „kalkulas pesas kaj mezuras“, jen Morariu, juna freŝa, vojaĝis el sub sun' romana, al sub malvarma sveda suno.

Ni ne forgesu pri Edmond Privat, „poeto de la Historio pri l' Majstro kaj pri nia Forto“.

La revuon de l' esperantaj eminentuloj fermas Lidja Zamenhof „kor' fervora, vartanta patran sent-heredon.“

Jen la koktajlo de ĉi libro. Do, ĝin per plena gorgĉkalibro Ektrinku nun samidean'!

ESPERANTO PER ESPERANTO. Leono Vienano: Lernolibro de Esperanto laŭ senpera metodo. Warszawa 1932. Paĝoj 66. Prezo: 1.75.

La pseŭdonima aŭtoro (Wiener?) eldonis tiun ĉi lernolibron evidente laŭ metodo de la hebreaĵ lernolibroj: „Ivriĥ b'ivriĥ“, aplikante ĝin preskaŭ tute bone por Esperanto. Ankaŭ la esperanta stilo de la aŭtoro estas korekta. Bedaŭrinde enŝteliĝis tro multaj prezeraroj, nekorektitaj eĉ en la kromfolioeto titolita: Reĝustigo de prezeraroj.

La lernolibro estas uzebla nur en kursoj, ĉar ĝi estas nure esperantolingva. Ĝian taŭgecon ni vidos post ĝia uzado. Ĉiokaze la apero de tiu ĉi lernolibro pruvas ke en E. same kiel en alilingva instruado venkas la senpera metodo, kiun tiel eminente enkondukas Ĉe kaj liaj disĉiploj.

CHARLOTTE BRONTE: „Jane Eyre“, el la angla lingvo tradukis H. J. Bulthuis ano de la lingva komitato. 493 paĝ.

Romano verkita de virino antaŭ cent jaroj — kaj nun tradukita en la plej moderna lingvo! — Tio parolas per si mem pri valoro de l' libro.

Ĝi, skribita tre interese — devis esti vera okazintaĵo en samtempa literatura mondo, ne nur koncerne al virina aŭtoro, sed ankaŭ kaŭze de problemoj, kiujn ĝi konsideras.

Nome la verko estas dediĉita al la aferoj de edukado de l' knabinoj, perlaborado kaj socia pozicio de l' instruantaj virinoj.

Enhavo apogita je la vivo de l' aŭtorino. — Antaŭ niaj okuloj preterŝovas sin plastikaj bildoj de l' ĉagrena orfa vivo de malgranda knabino en malamikeca onklina domo, kaj poste en severa kvakra, preskaŭ mallibereja atmosfero, de l' instituto por edukado de l' malriĉaj knabinoj en Lovood. Post ok jaroj Jane eliras de ĝi kiel guvernistino, kiu samtempe estis traktata de labordonantoj egale kun infanvartistino aŭ aliaj subuloj.

Tamen por Jane malfavora ĝis nun sorto ŝanĝiĝas kaj redonos al ŝi amin-dajn parencojn, riĉecon (kiel kutime en formo de l' neatendita heredaĵo) kaj kio plej grava donacos ŝin per grandega amo. — Ĉio estas bona, kio bone finiĝas, sed la antaŭe brava karakterplena knabino devis terure batali kontraŭ arigitaj bariloj por ellaboradi sian feliĉon.

Tiel aspektas agado, kiu abundas eĉ je tute sensaciaj turniĝoj.

Cent jaroj pasis, — la spaco estas videbla en malkonciza stilo kaj verkkonstruo. — En unuaj romanoj sekretplena komplikado de l' agado estas rezulto de laŭcela konsekventa procedo de herooj.

En „Jane Eyre“ la agadon antaŭenigas hazardo. Pardonu! — Ne blinda hazardo sed ĉion vidanta Providenco. — Psikologia kaj mistik-religia elemento dominas.

Por ni tiu libro je difinita tendenco, tre precize — oni povas diri kun pietismo tradukita, havas specialan valoron kiel klasika romano mora. Finante mi tutplezure ripetas vortojn de la tradukinto:

J. Eyre „unu el la plej belaj verkoj de la angla literaturo eniru la mondon kaj estu afable akceptata de la legantaj Esperantistoj“.

Z. Ĉ.

Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss, Kraków.

Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, ul. Stolarska 6.

ESPERANTYŚCI!

Nabywajcie niezbędny materiał propagandowy w języku polskim!

Czubryński — Esperanto i Esperantyzm; Wyd. I.	1.25
„ — Esperantyzm; Wyd. II.	3.00
Drojecki — Esp-o i jego zastosowanie w praktyce	0.30
Greffkołowicz — Niemi przemówią	1.50
„ — Spóźnione hasła, ze słown. esp.-pol.	0.50
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Kartki pocztowe (motto Żeromskiego) 10 szt.	0.50
„ — grób Zamenhofa	0.25
„ — pomnik Zamenhofa	0.30
Kronenberg — Dwa artykuły w sprawie Esperanta	0.30
Nalepki propag., pakiet	0.40
Serja widoków Krakowa (z tekstem esper.)	0.80
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego	0.15

poza to obfitą literaturę naukową, beletrystyczną wysyła za uprzednią wpłatą gotówkową na konto P. K. O. 406.660 z dodatkiem 15% na koszt przesyłki, najmniej 10 gr. (przesyłka polecona 65 gr. więcej).

Administracja „Polskiego Esperantysty“ Kraków, ul. Lubicz 34.

Katalog na żądanie bezpłatnie.

Ĉu povas esti esperantisto en Polujo kaj eksterlando kiu ne posedus la plej novan

„ADRESLIBRON DE POLLANDAJ ESPERANTISTOJ“?

Kune kun „Praktika Informilo Pro-Esperanta, kiu estas vera Enciklopedieto pri Esp. movado, 4060 adresoj, 4 alfabeto kaj numere ordogitaj Indeksoj, ebligantaj tujan eltrovon de la dezirata fak — tendenc — korespondem k. a.-samideano. 224 paĝoj, form. 19x14. —

Prezo enlande nur 4 zł., eksterlande 3.— sv. fr. Por poŝtelspezoj aldonu 10%.

Ricevebla ĉe la Librejo de „Pola Esperantisto“ Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO 406.660 aŭ senpere ĉe la eldoninto:

Jan Zawada, Warszawa 12, ul. Zaciszna 2.

Konto PKO 20.845.

Już ostatnie egzemplarze na składzie! Zamawiajcie póki zapas starczy!

„PEŁNY PODSTAWOWY SŁOWNIK JĘZYKA MIĘDZYNARODOWEGO ESPERANTO“

według uchwał akademji Esperanckiej w Paryżu z r. 1929 z pełną gramatyką i objaśnieniami.

Wprost u wydawcy: **Jan Zawada, Warszawa 12. Konto P. K. O. 20.845.**

Cena niżona zł. 3.— plus 10% na porto. Wpłaty zgóry.

INTERNACIA-RIADIO-SERVO — MIĘDZYNARODOWA SŁUŻBA RADJOWA

poszukuje współpracowników w całej Polsce, celem propagandy Esperanta we wszystkich rozgłoszeniach świata. Żądajcie planu pracy i informacyj.

W. Krzysztofowicz, Bydgoszcz, Unji Lubelskiej 5. m. 3.

Ĉiu serioza esperantisto legos kun granda intereso

KAZIMIERZ SMOGORZEWSKI

POL-POMERANIO

kun 26 kartoj (4 plurkoloraj), 136 paĝoj; el la franca tradukis S. Grenkamp-Kornfeld.

Prezo zł. 4.50, plus 10% por afranko. Ricevebla ĉe Libreja Fako de „Pola Esperantisto“ Kraków, Lubicz 34. Konto PKO 406.660.

XXIV-a Kongreso de Esperanto:

FAKAJ KUNVENOJ.

Kun la celo interesigi al Esperanto kiel eble plej multe da diversfakaj medioj en Paris, la Komisiono de fakaj Kunvenoj de nun proponas siajn servojn por faciligi al la diversaj esperantistaj faksocietoj renkontiĝon kun la respondaj samfakaj Asocioj en la Kongresurbo, aŭ eĉ oficialan inviton de la diritaj Asocioj.

Tial 1° ĉiu Faka Asocio de Esperantistoj bonvolu tuj informi la Komisionon, ĉu ĝi bezonas apartan ĉambron en la Kongresejo — por kiom da personoj proksimume, — kaj eventuale pri la programo de la kunsido.

Tial 2° ĉiu Kongresano, kiu deziras partopreni unu aŭ plurajn fakajn aŭ profesiajn kunvenojn, bonvolu montri la specialan fakon, je kiu li havas intereson.

Skribi rekte al la Komisiono por Fakaj Kunvenoj.

Adreso: ESPERANTO, 3 Boulevard Pasteur, Paris, 15-e.

Ni ripetas, ke ĉiujn gravajn informojn koncerne la Kongreson en Parizo ni konatigados pere de P. E. Individuajn respondojn pri la afero donas s-o Ludwik Kutscher, Redakcio de Pola Esperantisto, Kraków, Lubicz 34. Ne forgesu alsendi poŝtmarkon por respondo!

DE LA ADMINISTRACIO.

HERBERT HARDWAY, E. F. L. — ESTADO DE MINAS — FARIA LEMOS, BRASILIEN. Ĉar mi ĝis nun ne ricevis respondon je mia rekomendita sendaĵo de la 31. 3. 1930. (Vi ricevis ĝin la 22. 4. 1930. — estas afirmo de la poŝto), ni ne povas aprobi vian firmon kiel fidindan.

NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON POR J. 1932!

Pagu la abonon je nia konto PKO. 406.660.

Abonu mem kaj varbu novajn abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss.

Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, Stolarska 6.